De Rejno al Odro ni paŝis

WIR SIND DURCH DEUTSCHLAND GEFAHREN



2. Ni aŭdis la sonoradon / el tur' de apuda preĝej',
   |: la helan, agrablan zumadon / de l' burdoj en erikej'.

3. En lagoj kristalaj ni banis, / nin ravis ŝaŭmanta river'.
   |: Aero kaj suno nin tanis, / ni fajfis pri fia veter'.

4. Dumtage alaŭdoj jubilis, / resono de nia dezir'.
   |: Vespere la steloj ekbrilis, / spegul' de eterna sopir'.

5. Kaj vi, kamarad', estis kune / marŝanta kun mi tra la land'.
   |: Estonte veturos ni pluen, / al fora nova strand'.

WIR SIND DURCH DEUTSCHLAND GEFAHREN • germana popolkanto el la 19a jarcento, tre ŝatata en la junular-movado • E: Albrecht Kronenberger 2023-11-13, laŭ instigo de Karl Heinz Schaeffer, kun danko al Bernhard Eichkorn

Ekzistas diversaj melodi-versioj.
Mi prenis tiun, kiun mi ekkonis kiel junulo en la 1950aj jaroj.